

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R.Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sokr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
C.C.P. Association Catholique Française pour l'Espéranto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 3 F. Abono: 12 F. Kotizo: 3 F. Sume: 15 F. ====

+++++

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de decembro, marto, junio kaj septembro.

+++++

---- N° 122 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
**** SANKTA PIO X-a, preĝu por ni. ****

---- OKTOBRO 1979 ----

+++++

BILETO DE LA PREZIDANTO.

Avec l'automne, les cercles espérantistes retrouvent leurs activités, Entre les amis de la Langue Internationale, c'est la partage des souvenirs de voyages, de rencontres, de congrès, de contacts avec les autres pays. Pour beaucoup, l'été aura été l'occasion de se retrouver dans l'ambiance amicale avec nos "samideanoj", qui caractérise notre mouvement.

Avons nous suffisamment conscience de l'importance des rencontres, nationales ou internationales, qui sont pour tous une contribution à leur propre culture, à leur plaisir aussi sans doute, mais témoignent de l'intérêt pratique d'un langage par lequel chacun se sent de plein-pied, sans la gêne née de la diversité des origines, avec l'interlocuteur. Loin de perdre sa propre individualité, chacun peut l'exprimer librement et à égalité avec celui qui lui répond.

Ces rencontres, ces cercles, les organisations auxquels participent les Espérantistes préparent un avenir qui doit apporter au monde plus de compréhension, plus d'entente. En ce temps où la machine tend à se substituer à l'humain, où est le meilleur progrès, sinon dans les rapports directs avec les individus et avec les masses, plutôt que la mise en oeuvre par le truchement de l'électronique, d'un appareillage qui, si l'on peut dire, constitue une prothèse à la principale infirmité de nos sociétés, l'impossibilité de se comprendre directement au moyen des mêmes mots ? -

Membres de notre Association, participants et amis de l'Espéranto (et ces derniers bientôt pratiquants à leur tour) nous avons pour but de servir l'Eglise en témoignant de notre Foi dans les divers milieux espérantistes, mais aussi d'introduire dans les milieux chrétiens le seul véritable moyen d'établir des rapports spirituels et culturels à dimension mondiale et universelle, et d'orienter l'effort pastoral vers les groupes qui partagent avec nous l'idée d'un rapprochement par une langue et une culture universelle.

.../...

.../...

Le mouvement catholique, représenté notamment par I.K.U.E., entretient, dans les mêmes buts, des rapports très fraternels avec les chrétiens de toutes confessions, dans un esprit authentiquement oecuménique.

Mais pour que notre Association soit vivante, il est nécessaire de multiplier les rapports entre nous, afin que les efforts des uns et des autres soient soutenus par la connaissance des expériences, des réussites, et des progrès de nos membres dispersés : nous suggérons à tous les groupes locaux, si petits soient-ils, d'adresser de temps à autre des comptes-rendus, des suggestions, des offres de participation à notre Comité national, d'adresser des nouvelles de faits concrets à la rédaction de notre bulletin.

Et le principal échange, c'est aussi la prière, qui met chacun de nous en présence de Dieu, en union avec ceux que notre idéal commun rend proche de nous.

En écoutant les émissions de Radio-Vatican en multiples langues, nous pouvons recevoir, pendant les brefs instants qui leurs sont consacrés, les deux éditions hebdomadaires en Espéranto. Nous espérons qu'un jour, la diffusion de la langue aura atteint un niveau suffisant pour que certains thèmes essentiels puissent être traités en une seule fois et atteindre sur tout le globe d'innombrables auditeurs de toutes langues.

La progression vers un tel objectif est entre les mains de chaque groupe, de chaque individu, elle sera le fruit de multiples efforts qui se développeront tant parmi les chrétiens agissants, que par tous ceux qui participent aux diverses organisations espérantistes culturelles ou spécialisées, dans une perspective universaliste comme dans celle qui est propre aux buts poursuivis par notre Association.

R. Cl. COLAS.

XX

AFORISMOJ de Arvo Valton (daŭrigo)

Se homo havas nenion, li ne timas perdon. Ju pli multe li havas tiom pli granda estas lia timo, tiel lia dormo estas ne profunde kaj tagojn plenumas vizioj.

Kiu situas supre, tiu timas, ke iu lian lokon deziregas. Kiam apud li estas neniu plu, ektimos li la propran ombron.

Monto, kiu dormas, ne estas potenco. Por rompi oni devas movi, por konstrui oni devas ion fari. Kiu estas potenco, tiu ĉi devas montri al si men káj al aliuloj, ke li estas potenco, alie li ja ne estas tia.

Saĝeco estas kiel malsata bovo, kiu konstante postulas nutradon per herbo de scio, sed ĝi devas havi tempon por remaĉado, kiam ĝi sian manĝaĵon digestas.

Saĝa faro ne naskiĝas per si mem, pro ĝi oni devas esti singarda. Stultaĵo sekvas stultaĵon facile, unu nutras alian kaj elkreskas el alia.

Se homa fato montras malhelan koleron, faras li ĉiam tiom, kion ne necesas fari.

FINO.

XX

VENONTA KOMITATKUNVENO.

Dimanĉon, la 9-an de decembro 1979, je la 14.30; 4 bis, rue de la Cerisaie
PARIS -4^e-

La observantoj daŭre estas bonvenaj !! (métro : Bastille)

LINGVA ANGULO

Venis la kutimaj tradukoj de S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G), LE MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU (M). Jen iliaj proponoj:

1) avoir le feu au derrière: havi ian urĝegan bezonon rapidi, forkuri kvazaŭ pe- late de fajro (B); troige rapidi (G); ekscitite hasti (L); agitiĝi kvazaŭ gluteo brulus (M).

2) il n' a pas le feu sacré: li montras menian fervoron (B); li tute ne estas fervorulo (D); li tute ne entuziasmas (G); al li mankas entuziasmo, fervoro, ar- do (L).

3) il n' en fiche pas une ramée: li restas tute senfara, lia produktemo estas nula (B); li evitas ĉian laboron (D); li vere estas mallaborema (G); li estas pleje pigrulo, li fajfas pri sia tasko, li havas mallaboremom (L); li penas eĉ ne etmove, li tute senokupiĝas (M).

4) au fil des heures: kun paso de ĉiu horo, dum la sinsekvo de la horoj (B); laŭ- longe de la horoj, laŭ pasantaj horoj (D); dum horoj forpasas (G); laŭ la fluantaj horoj (L); je sinsekvo de la pasantaj horoj, laŭ tempoflugo (M).

5) c' est une fine lame: li estas lerta skermisto, spadisto (B); li estas lerta skermanto (D,M); lerte li uzas glavon (G); li lertege, fajne skermas (L); li estas lerta spaduzanto (M).

6) filer au nez et à la barbe de quelqu' un: forŝteliĝi antaŭ ies nazo (B); sen adiaŭo forŝoviĝi (D); senkaŝe elŝteliĝi (L); eskapi vidate de postkuranto (M).

7) il nous a filé entre les doigts: li forglitis el niaj manoj (B); li nerimark- ite eskapis (D); li eskapis el ni (G); li fuĝis el niaj manoj (M).

8) filer le parfait amour: reciproke travivi amaferon, kolombumi (B); vivi en plenama akordo (D); pasiige ami (G); travivi sennuban amon (L); ŝpini, varti per- fektan amorsenton (M).

9) c' est une fine bouche: li estas frandemulo (B,G); li estas frandema palato (B); li estas frandema (D); li ĝuas delikataĵojn (L); li estas subtile gustosen- sa (M).

10) faire la fine bouche: malŝate manĝi (B,D); malŝatafekti (B); montri malestimam emon por io (D); afekti elektemon, postulemon (L); afekti naŭzetemon (M).

Definitiva klasifiko por 1979: 1) S-ro LE MARQUAND (24); 2) S-ino MICHAU (21); 3) S-ro BOURGOIS (14); 4) en egaleco: S-roj DAUCHEZ kaj GUILLON (10).

Sekve, S-ro LE MARQUAND gajnas premion en valoro de 50 F, S-ino MICHAU premion en valoro de 30 F kaj S-ro BOURGOIS premion en valoro de 20 F.

La tri gajnintoj bonvolu skribi al la kasistino pri siaj deziroj: abono al gazeto, aŭ libro(j), aŭ kreditkarto.

Per la ĉisubaj proponoj de S-ro Bourgeois komenciĝas la konkurso 1980 kun la jenaj premioj:

1) 50 F 2) 30 F 3) 20 F

Novaj esprimoj: 1) au bas mot; 2) filer le train; 3) le fil du rasoir; 4) il faut cerner la vérité; 5) tu fais le coup; 6) à quoi bon se casser la nénette; 7) il a avalé un parapluie; 8) crotté comme un barbet; 9) être sur la balance; 10) c' est un bourreau de travail.

=====

ELDONA FONDUSO 1979 (3-a listo)

5) F-ino Le Boëdec: 50 F. Sume: 438 F. Sinceran dankon.

=====

NOVAJ MEMBROJ 1979.

5) S-ro LEGER (Val de Marne); 6) S-ro BOUCHEZ (A-M). Koran bonvenon!

BIBLIAJ NOMOJ (daŭrigo)

ADULTO

"Osto el miaj ostoj, karno el mia karno,
Pro vi patron, patrinon mi forlasis en ĝojo
Por ĉiam vin apudi sur la geedza vojo
Plukadante la amon el via plaĉa ĉarmo".

Tiel parolas la viré en plej fervora varmo.
Trinku el via fonto, fidu al via roĵo,
Ne forigu l' edzinon eĉ ne por unu fojo,
Por ke sur ŝia vango neniam ploru larmo.

Kial do, ho mia gent', vi tro ofte forgesas
Vian flegantan Dion en pekkrianta tumult'
Kaj ne ĉiam respektas, kion vi mem promesis?

Kie estas juna flam'? Kie kretenera kult'?
Vin mi plene prizorgis! Mia korpo abscesas
Pro doloro tro forta. Kial do venis adult'?

11/2/1978

ADULTINTINO

Frumatene entemple, meze de la popolo
Side Li instruadas simple kiel kutime,
Ĉar Li pleje deziras, ke la homo intime
Vivu kaj por la Patro kaj por Ĉies konsolo.

Nu abrupte jen kelkaj kun malbona parolo
Interne de virino, kiu mallegitime
Amis aliés edzon. "Diru al ni sentime,
Kion vi opinias laŭ moseprotokolo".

Sed Jesu sin klinis kaj skribis sur la tero
Ligante ĉiun homon al lia propra peko.
Kie estas kondamno? Kaj kie la sincero?

Ili fine forkuris sen ia grumbla bleko,
Lasante dipardonon al la vera mizero.
Ĝoju, adultintino, okazas gracia veko!

12/2/1978

AFLIKTO

Ĝis kiam, Eternulo, vi tute min forgesos?
Ĝis kiam vi forprenos de mi vian vizaĝon?
Ĝis kiam mi manĝos nur la porbestan furaĝon?
Ĝis kiam en animo la prizorgoj ekscesos?



Ĝis kiam mia haŭto fiapuse abscesos?
Ĝis kiam mi suferos la hombrutan sovaĝon?
Ĝis kiam mi spertados la malamikan raĝon?
Ĝis kiam noktotage turmentoj skrapkaresos?

Helpa ĝojo, ama bon' el neniu venas kaj
Ĉiuj miaj pripensoj batalas pro konflikto:
Mian ŝipon zigzage mispelas aĉa pagaj'.



Sinjoro, Patro mia, ĉu daŭrados verdikto
Pri dolora ĝemado kaj plorkriega malgaj'?
Ĉu do ĝis mia morto apudos min aflikto?

DEGRELLE Roger 13/2/1978

SOLVOJ de la A 15, A 16, A 17, A 18, A 19, A 20 problemoj :
 Formetu aŭ transloku la "blankajn" alumetojn.



Ĉiam uzante la sep pecojn de tiu tre
 praa ĉina ludo nomita "Tangram", vi
 povas per ili fari figurojn inter kiuj :
 kvadraton, rektangulon, triangulon kaj
 multajn aliajn pri : objektoj, bestoj,
 personoj, k.t.p.



LA IKUE - KONGRESO

La urbo Luksemburgo, iama Ĉefurbo de la "Département des Forêts", hodiaŭ verda koro de Eŭropo, akceptis dum unu semajno 200 katolikajn esperantistojn el 20 landoj. La kongresejo bone situis sur la ĉefplaco, kie svasmas promenantoj kaj turistoj.

Multaj scivoluloj vizitis la tre taŭgan ekspozicion kaj interesiĝis pri la Internacia Lingvo kaj la kongreso. Pruviĝis la taŭgeco de nia lingvo en la vivanta praktikado antaŭ la neesperantista publiko, kiu povis vidi nin babili, kanti, preĝi, prelegi en Esperanto. La lokaj ĵurnaloj, Le Républicain Lorrain, franclingva, kaj Luxemburger Wort, germanlingva, ĉiutage detale raportis pri la kongreso kaj informis pri la taga programo.

La ministroj, la urbestrino, la episkopo vizitis la kongreson. Dum la malfermo, la prelego de S-ro Tonkin estis vere atentinda. Ni estis akceptitaj en la urbodomo, kie ni ricevis belan memorlibron pri Luksemburgio subskribitan de la urbestrino.

La diversaj prelegoj pri la jaro de la infano, lepruloj, aborto, aŭtanazio kaj la antikva pilgrimvojo al S-ta Jakobo de Kompostelo estis ĝuo kaj plezuro por la spirito.

La episkopo ĉeestis la imponan malferman diservon en la katedralo, la multaj pastroj ĉiutage kuncelebris. La ĉeestantaj turistoj aŭ Luksemburganoj povis sekvi la preĝojn per la libroj, kiujn enmanigis al ili Pastro Kindler, la lerta organizanto de la tuta afero.

Okaze de la kongreso, la IKUE-estraro kunvenis; oni eĉ asertas, ke ĝi bone laboris. Bedaŭrinde tio restis sekreto, ĵaluze konservita, kaj neniu sukcesis scii, kion oni diris kaj decidis, eĉ post la vizito al kelo de Mosel-vino!

Dum la tuta kongresa semajno, la urba poŝtoficejo uzis specialan stampon kun la surskribo "Esperanto, internacia lingvo, langue internationale", kiu tre allogis la filatelistojn.

La distra parto, ampleksa kaj varia, plene sukcesis. La kantistoj Alberta Casey kaj Olivier Tsaut, la magiisto Trixini, la pantomimo Jomi, la klabano Frank Caroli kaj la akordionistino Monique Leider ricevis varmajn aplaŭdojn.

La vizito de la urbo kaj de ties grandduka palaco, same kiel la du tuttagaj ekskursoj vekis atenton kaj intereson de la partoprenantoj. Spite de la pluveto, Clervaux, rava loko meze de arbaro, Vianden, kiun vizitis Victor Hugo, Echternach, fama abatejo, lasis al ĉiuj agrablan memoron.

La dua ekskurso al Treviro en Germanujo okazis sub varmeta suno kaj estis tre interesa pro la romiaj vidindaĵoj (baziliko kaj urbopordo) kaj la belega ĉefpreĝejo, kie oni konservas la nekudritan veston de Kristo.

Dank' al la bonega organizado kaj la afabla nelacigebla laboro de niaj luksemburgaj amikoj, la kongreso en Luksemburgo restas neforgesebla.

Laŭ la raporto de F-ino Vanneau kaj S-ro Bessière.

NDLR. - Ĉar atingis min du bonegaj raporto, kiujn mi ne povas ambaŭ publikigi, mi eltiris la ĉefajn punktojn por informi la legantojn, kaj petas pardonon de la bonvolaj aŭtoroj.

www

VATIKANA RADIO

Ni havas la bonan ŝancon posedi en la centro de la tuta katolikaro taŭgan radion, kiu po dufoje semajne disaŭdigas en nia kara lingvo Esperanto. Tio estas granda sukceso survoje al la fina venko. Sed, fi la ĉiama sed! sed tiu sukceso ne venas sendube de la Francoj. Ĉiu el ni devus skribi almenaŭ po unufoje momate al nia radio por danki, instigi, helpi, doni novaĵojn aŭ nur amiksignon. Mi petas ĉiujn membrojn kaj legantojn de FKE, ke ili prenu pluman kaj kuraĝon kaj ke ili plenumu tiun tute normalan devon. Ĉu iam Vatikana Radio dronos en feliĉo kaj kuraĝigo pro alta tajdo de leteroj, poŝtkartoj, mesaĝoj? Mi fidas je via komprenemo ne nur vorta, sed ankaŭ aga.

Roger Degrelle, ĉiutaga skribanto al V.R.

Adreso: RADIO VATICANA 00120 CITE DU VATICAN

"Ĉu ili ĉiuj malsaniĝas?" "Estas strange, ke ĉiuj malsaniĝas". "Eble, ili manĝis venenajn fungojn". Do, kelkaj vilaĝanoj vizitis la templon. Sed la figurojn de la pastro kaj akolitoj ili ne povis trovi. "Kien ili iris?" "Kial ili forlasis la templon?" Nur staris en la ĉeftemplo la statuoj de Budho kaj Dek ses Araĥanoj (budhismaj sanktuloj).

Laŭ la sciigo de la vilaĝanoj, tri feŭduloj portantaj du glavojn ĉe la flanko venis al la vilaĝo por esplori la aferon. Vespere, la sonorado vere aŭdiĝis el la fundo de la lago, kiel la denuncio. La feŭduloj estis mirigitaj, sed ŝajnigante bravuloj, ili ekiris kun kelkaj vilaĝanoj al la templo. Jam fariĝis mokto, sed neniu revenis el la templo, ankaŭ en la sekvanta tago. Poste, neniu vilaĝano proksimiĝis al la templo, neniu feŭdulo vizitis la vilaĝon.

Estis frua aŭtuno, ĉiumatene fiŝistoj rigarde esploris la aspekton de la ĉielo. Malgraŭ tia malbona vetero Tigrino fiŝadis marmeze. Maso da nigraj nuboj rapide etendiĝis de sudo al nordo kaj baldaŭ kovris la tutan ĉielon. "Ventego!" ŝi mallaŭte eldiris.

Ŝi reŝis kaj remis celante la teron, sed forto de la ventego superis tiun de Tigrino. La ŝipeto estis forportata norden kaj norden. Sed ŝi estis tute trankvila, ĉar tia akcidento okazis pli ol unu fojon en du aŭ tri jaroj. De la urbeto, en kiu Tigrino loĝis, al la aperturo de la lago, marborda linio rekte kuris. Sur la rekta marborda linio (ĉirkaŭ 35 km) oni ne trovis ian ajn rifuĝejon. Pro tio, oni kutime rifuĝis en la lagon, kiam ŝipo estis norden forportata. Ankaŭ ŝi, kiam la ventego iom kvietiĝis, rapide fuĝis al la lago.

Tigrino ripozis en kabano konstruita sur la lagbordo kaj aŭdis de iu vilaĝano la strangan rakonton. "Kiam la sonorilo sonoras, tiam miaj haroj hirtiĝas", parolis li. "Kredeble, la feŭduloj kaj vilaĝanoj estis mortigitaj de aro da banditoj; sed - ĉu oni povas sonorigi la sonorilon sur la lagfundo?" Ŝi enpensiĝis.

(daŭrigota)

UNE LANGUE INTERNATIONALE POUR LE MONDE ET POUR L' EGLISE

Niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne mendis tiun bonan verkon, malpravus! Ekde nun, ili devos pagi pli multe. Jen la novaj prezoj afrankite (ĝis la plialtigo de la poŝtaj tarifoj!):

1 ekz. 18,50 F; 2 ekz. 35 F; 3 ekz. 50 F; 4 ekz. 67,20 F; 5 ekz. 82,20 F...

Mendu rekte de P. Bourdon 7, av. Salomon 59000-LILLE p.ĉ.k. 1909 49 Y Lille.

KELKAJ POEMOJ de Roger DEGRELLE

Por mi la knabaro estas la espero
De la estonteco dank' al dia ben',
Kiu baldaŭ ludos lerte sur monda scen'
Akton kun viva frukt' ĉiam en prospero.

Por mi la knabaro estas vigla ĝojo
Mondon ridiganta por komuna plezur',
Kaj ĝi havas forton kiel en la natur'
La tutjunaj ŝosoj kreskaj el purrojo.

Forton knaboj havas, same delikaton
Pro ilia junec' kaj ilia malspert'.
Ili kalkulas ja kun plenkreska avert'
Por atingi certe la iniciaton.

Kial do, ho fratoj, de Esperantio
Vi ne zorgas plie por ilia sukces'?
Ĉu nia movado estas nura kermes'?
Tamen knaboj estas nia garantio!

* * * *

Amo al nia Di!
Amo al la homo.
Jen la aksiomo
De veka rapsodi!

El mia plej lerto
Mi sendas amike
Saluton muzike
En versa koverto.

Kun beno de Dio
Kaj kun preĝo de hom!
Venas al mia dom!
Frata melodio.

Mi rapidas
Urĝas tempo
Amprintempo.
Al mi ridas.

Dio donacas
Ĝissate sen ĉes!
Danki sen forges!
Lin mi aŭdacas.

Num alvortas
Papa radio
Ĝojon de Dio
Ĝi alportas.

=====
ANGULO DE LA KASISTINO.

Ekde la 1-a de januaro 1980, la baza jarkotizo iĝos 15 F, sed, ĝis la 31-a de decembro, vi rajtas pagi por 1980 nur 12 F. Faru tuj, se ne vi forgesos.

Bedaŭrinde, ĉiujare, ni devas eklogi kelkajn anojn, kiuj verŝajne - kaj malgraŭ realvokoj - tute forgesis sendi sian kotizon. Ve! nia asocio ne povas vivteni sin sen mono, kaj ne eblas liveri la bultenon senpage. Pripensu, kio estas 12 F: nur 1 F ĉiumonate!! Ĉu ekzistas iu Franco, kiu ne povas tion elspezi? Se vi estas tiagrade forgesema, nepre iĝu dumviva membro (DM) kaj profitu la favoran tarifon: 240 F, nur ĝis la 31-a de decembro. Se vi jam estas DM kaj tamen deziras helpi FKEA, vi ja rajtas ion donaci. La p.Ĉ;K; daŭre oscedas:
Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N. ROUEN. DANKEGON.

=====
KOTIZTABELO 1980

IKUE kun "Espero Katolika". 48 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto". 15 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj. 7,50 F
Bonfaranto 75 F
Dumviva membro 300 F

UFE kun "Revue Française". 80 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 110 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo". 35 F
Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

=====
Dépôt légal: 4ème trimestre 1979 !!! Polycopié par F. M. C.
Papier de presse n° 34 745 !!! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
Directeur-gérant: Gaston Véron !!! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE